

4. Proponoj al la landa kunveno

De Ingebjørg Rambjør pri redukto de la estraro

Ricevita retpoŝte la 26-an de aprilo 2021:

«Mi sendas iujn pensojn, kaj kiel privata persono kaj kiel membro de la nomuma komitato, pri la estraro de NEL. Hodiaŭ estas sep homoj, kun la du anstataŭantoj en la listo de nomoj de homoj asociitaj kun la estraro. NEL nun estas organizo kun Ĉirkaŭ cent membroj kaj mi pensas, ke eble estos tempo por redukti la nombron de estraranoj.

Kaj ĉi tie envenas la nomuma komitatano, nun parte malfacilas trovi novajn membrojn por la estraro. Tamen mi nun havas iujn novajn nomojn, sed plej multaj estas homoj, kiujn mi persone ne konas.

Mi pensas, ke la estraro povas diskuti pri tio kaj tiam ni devas kruci niajn fingrojn, por ke ni havu funkciajn estraron kun iuj veteranoj kaj iuj novaj homoj».

Rekomendo de la estraro: La statutan datlimon pri ensendo de proponoj antaŭ la 1-a de marto ni interpretas tiel, ke la estraro havu tempon pritrakti la proponojn antaŭ la publikigo unu monaton antaŭ la kunsido. Se venus prete formulita ŝanĝpropono (la propono postulas ŝanĝon en kaj §13 a kaj b), la estraro proponus trakti ĝin. Tio ne haveblas. La estraro anstataŭe proponas diskuti la aferon en la landa kunveno kaj prokrasti la formalan decidon. Se ne estos sufiĉe da kandidatoj por la nunaj 5+2 membroj, ni devos nun elekti nekompletan estraron kaj praktike solvi la demandon pri kvorumeco.

De Mario Machlik, pri Ĉiujaraj kongresoj

Mario Machlik proponis, ke NEL konsideru fari Ĉiujarajn norvegajn kongresojn, alterne virtualajn kaj fizikajn.

Laŭ la statuto, Ĉiujaraj kongresoj fakte estas la baza opcio, do ne necesas statutŝanĝo por fari la venontan kongreson en 2022.

Rekomendo de la estraro: Ni diskutu la aferon en la landa kunveno kaj faru decidon tie.

De Douglas Draper, pri eventuala malmembriĝo el la studorganizo Næring og samfunn

La kotizo al la studorganizo estas nun 2 000 kr. La kotizoj por ricevi subtenon striktiĝis: Devas esti kursgvidanto + minimume kvar partoprenantoj. Sufiĉas kvar horoj da studado. Ĉu indas por NEL plu resti membro en Næring og samfunn?

Rekomendo de la estraro: Ni diskutu la aferon en la landa kunveno. La formalan decidon ni proponas lasi al la nova estraro.

Repago al la kluboj kaj al NJE

Laŭ la statuto, paragrafoj 8 kaj 10, la landa kunveno decida, kiom da mono estu plupagata al la kluboj kaj al NJE.

Rekomendo de la estraro: La kluboj ricevu jare por ĉiu membro 25% de la pagita kotizo de tiuj membroj. Nur kluboj kiuj faras jarkunvenon kaj sendas laŭstatutan jarraporton ricevu financon subtenon. NJE ricevu jare 85% de la pagita kotizo de la junularaj membroj.